BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — Nº 2. Oktobro

## ASASINO

Nia fidela, konata respektemo por la Lingvo permesas al ni hodiaŭ krii tiun novan vorton : sciu la Esperantistoj, ke ĝi ekmankas al ni, de l'dektria de Oktobro. Je tiu tago nia nobla, nia modesta societano Francisko Ferrer Guardia fariĝis la glora martiro de l'niatempa Liberpenso, kaj al la potenca laboro de sia senripoza vivo aldonis la trofruajn fruktojn de morto jam nun efikanta.

Sur tiu nigrakadra paĝo, ni do skribos esperajn vortojn. Se niaj koroj indignegis pro la forbato de tia forto mire agada, kreskema, juna, se nia pensa fiereco, nia honoro de civilizuloj kruele suferis, kiam pri senhonta sovaĝeco la Hispana registaro superis eĉ la Rusan (ĉar Tolstoj pro persekutoj malsaniĝas, sed ne mortis), tamen ni ĉiuj komprenas, kaj li mem Ferrer, konsciis, ke nun ne estas plu ebla kaŝi eĉ post Pireneoj, eĉ sub jugistaĉaj retoj iajn malhumanajn farojn, kaj ke inter la armiloj ĝis la reĝaj intrigejoj, ĝis la jezuitaj nigraĵoj penetras venĝa rigardo de l'popoloj fratiĝantaj. Ni pensemuloj ne miros, kiam, laŭ natura leĝo, manoj sekvos post okuloj.

Vivu pli Libera Penso, vivu Ferrer jam senmorta!

# La Pledo por Ferrer

Ni opiniis povi nenion fari pli bonan por honori la viktimon kaj hontigi la buĉistojn, ol publikigi la pledon prezentitan antaŭ la milita konsilantaro de alia grandkora viro, elektita okaze pro simileco de nomoj, kapitano Francisko Galceran Ferrer. Ĉiu klarigo taŭgus nur malfortigi tiun sinceran kaj logikan elokventon, kiu post la krimo ekprenas mem aspekton de tragedia ironio, ne minaca fataleco.

Ni eldonas nun broŝuron kun tekstoj esperanta kaj franca; se eble baldaŭ sekvos angla kaj germana eldono.

La prezo estas 6 sd. (fr. 0.15); kun rabato por kvantoj. Afrankite 8 sd.

## LA PROTESTOJ

Ni ne entreprenos raporti pri la sennombraj indignesprimoj prezentitaj en ĉiuj landoj de politikaj grupoj, de laboristaj sindikatoj, de sciencaj asocioj, de ĉiufakaj eminentuloj, de tutaj grandurbanaroj. La kontraŭespera atenco okupis ne nur la tutmondan gazetaron sed, oni rajtas tiel diri, la universalan animaron.

Prefere ol artikolojn jam ĉiuflanke legitajn ni enpresas kelkajn leterojn de societanoj mem, interesajn por la aliaj.

### EL KATALUNLANDO

...Ĵus mi legis, ke Ferrer aperis antaŭ siaj juĝintoj, kiuj mortkondamnis lin. Mi atente legis ĉiajn pruvojn alportititajn de la atestantoj: ĉe neniu el ili ĉiuj mi trovis gravecon; ĉiuj sole montris malamon personan, kaj el ĉio ĉitio, mi konkludis, ke oni lin ne mortpafus. Tamen ni vidis, kiel malprave mi juĝis: tri tagojn poste, Ferrer ne plu ekzistis sur tero persone; ideale li neniam malaperos. Lia koro lokiĝis en ĉiujn liberajn korojn. De nun liaj verkoj, en kiuj li skribis tiom da veroj, estos la ĉiutagaj legaĵoj de l'liberamantoj. Eble ili kuraĝigos nin elporti ĉiujn malfeliĉaĵojn, dum ni iras en Hispanujo la krutegan nun-

tempan vojon, sur kiu ni devas marŝi plej silente kaj zorge. Malfeliĉa, kiu kuraĝas malfermi sian buŝon! malfeliĉa, kiu ne zorge trairas! Kiom da fojoj ni, ribelintoj katalunaj bedaŭras la nealportitan sed promesitan helpon de niaj samlandanoj el aliaj regionoj! Kun ĝi ni estus trafintaj nian celon. Militon, religion ni estus forigintaj; kaj nun jen: *Milito plenumas kion Religio ordonas*. Niaj fortoj, kvankam multaj, ne sufiĉis.

(Poste prezentiĝas ideo traduki en Esperanto la verkaron de Ferrer).

## EL HISPANA ĈEFURBO

...Ĉe leŭtenantoj kaj kapitanoj estas multaj, kiuj kondamnas la mortpafon; kontraŭe ĉe la ĉefoj kaj generaloj, malmultaj. Tamen ili laŭ natura leĝo malaperos kaj ni ĝeneraliĝos: la estonto estas nia, por la liberpensuloj.

## EL PARIZO : de S-ro G. Moch

*Mi skribis ĵus al S-ro Laisant la jenon :*

Kara Sinjoro Laisant,

Ĉar la krimo estas nun plenumita, la liberpensuloj devas devenigi ĝiajn konsekvencojn, alimaniere ol lasante malordemulojn ekspluati ĝin.

Ĵurnaloj diris jam, ke tago venos — ni esperu, baldaŭ! — kiam monumento al Ferrer staros en la mezo de Barcelona. Tiu monumento devas esti starigata per internacia monoferado, kaj la kolektado devas daŭri konstante ĝis la tago de la honorriparo, por ke la publika atento ne povu forlasi la nunan honton.

Sed tio ne sufiĉas. Ferrer postlasis kvar gefilojn, kaj mi legis tiumatene, ke al lia unuanaskita filino, por kies bezonoj li zorgis ĝis sia enkarcerigo, restas nur ĉiutaga salajro da du frankoj, kiun ŝi ricevas en fabrikejo, dum ŝi estas graveda de ok monatoj kaj havas du infanojn malsanajn en hospitalo! La plej granda parto de la kolektota mono estas do dediĉinda al la gefiloj de Ferrer; ĉar, kiel monumento, sufiĉos bronza tabulo, kiu rakontos ĉiujn detalojn de la krimo, por la instruo kaj edifo de la posteularo.

Ŝajnas al mi ke vi estas, kiu povas iniciati tiun monkolektadon, Via kore sindona Gaston MOCH.

P. S. — Mi skribis la ĉi supran noton en la unua momento de indigno. Dume..... S-ro Laisant sendis la jenan belan telegramon al la Akademio de Sciencoj de Madrid, kies korespondanta membro li estis :

« La neriparebla krimo estas plenumita.

Ferrer la senkulpa, Ferrer la granda edukisto falis sub la batoj de la asasinistoj (1).

Volu forstreki mian nomon el la listo de viaj membroj korespondantaj. Nenio povas plu resti komuna inter la Hispana monarkio kaj la konscienco de honestulo.

Ĉu oni lasos ankaŭ asasini la kuraĝozan Francisko Galceran ?

Ĉiuj miaj deziroj por la renaskiĝo de via malfeliĉa lando ».

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro D-ro Fr. Uhlmann, *Huttwil* (Svisujo.

S-ro D-ro Perros, rue Beaurepaire, *Sens* (Francujo).

Eksiĝis S-ro Papillon. — Entute : 128 membroj.

## KASO. — Oktobro

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | $ 6.40 |
| | Kotizo 1908-1909 de Watters | 0.91 |
| | — — & 1907 de Felser | 1.94 |
| | — — & donaco de Fridrich | 1.94 |
| | — 1909-1910 de P. Bunemann | 0.92 |
| | — — Raftopulos | 0.92 |
| | — — Deshays | 1 » |
| | — — Redondo | 0.99 |
| | — — Priou | 0.99 |
| | — — Perros | 0.99 |
| | — — Papillon | 0.99 |
| | Sume | 19.93 |
| *Elspezoj* : | Sendo de la Septembra bulteno | 4.34 |
| | Kotizoj al la Internacia Federacio | 5.15 |
| | Jarlibro de la Federacio | 0.60 |
| | Poŝtmarkoj, telegramo | 0.99 |
| | Sume | 11.08 |

Restas en kaso : $ 8,85.

**Ne prokrastu** la pagon de la **kotizo** sept. 1909-1910. Resendu la voĉdonilon antaŭ la fino de Novembro.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*

*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 $ (Fr. 2.50)*

(1) Asasini (Angla, Franca, Hispana, Itala, Portugala radiko) mortigi krime.

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)